

Diru tridek tri

[el la Itala Esperanto-Federacio revuo "L'esperanto"]

de Renato Corsetti

6) Omaĝe al Claude Piron [Klod Piron]

La esperantlingva komunumo perdis unu el siaj gurooj. "Guroo" ĉi tie estas uzata en la komuna okcidenteŭropa senco de "gvidanta saĝulo". Antaŭ ne longa tempo forpasis Claude Piron, kaj pri lia morto ĉi tiu revuo raportis.

Li estis la plej konata el la "skemistoj", tio estas la esperantistoj, kiu volas ekspluati ĝis maksimumo la latentajn eblecojn de Esperanto por konstrui vortojn. Se vi vere volas omaĝi lin, vi devus aĉeti ĉe la libroservo lian libron "La bona lingvo".

Ĉi tie tamen mi prezentas el tiu libro parteton de la ekzemplojn de la eblecoj kreeme konstrui novajn esprimojn per la rimedoj de Esperanto. Temas pri frazoj diritaj de normalaj esperantistoj kaj kolektitaj de Piron. Mi simpligas ankaŭ la indikojn pri la loko kaj dato, en kiuj la frazo estis dirita, sed mi aldonas la itallingvan tradukon, kiam tio ŝajnas necesa.

- Mi ne estas tre orema (Mi ne emas aĉeti oraĵojn), Polino antaŭ oraĵ-butiko.
- Kelkaj italoj estas politike ajnistaj (*qualunquisti*), Italo en Pekino.
- Imagi, ke la homaro subite malstultiĝos (saĝiĝos), usonano en Tokio.
- Bona profesoro ne profesoras (*non si atpeggia a professore*), japano en Tokio.
- Oni nun pli simple frazas, ĉino en Tokio.
- Ĉu li oĉjas? (*si comporta come lo zio rispetto ad altri bambini*), Francujo.
- La fenomeno de denaskismo (*il movimento per insegnare l'esperanto ai bambini dalla nascita*), Francujo.
- Katolikece aŭ pli ĝuste katolikige skizita kultura idealo (*un ideale culturale non solo di tipo cattolico ma che tende a fare del proselitismo cattolico*), polo en Svislando.
- Levu la manon, kiuj protestas... Nun levu la manon, kiuj malprotestas, norvego en Oslo.
- De ĉi tiu stacio la diversaj tramlinioj disbrakas (*si diramano*), norvego en Norvegujo.
- Ili utilis por eldomigi fumon (*erano utili per far uscire il fumo dalla casa*), norvego en Norvegujo.
- Nia proksimiĝo al ĝi [Esperanto] estas tro pria, ne sufiĉe pera (*il nostro approccio all'esperanto sa troppo di interessamento alla lingua e non abbastanza di utilizzazione della lingua*), finlandano en Finlando.

- La funkcio de interlingvo estas esti intera (*la funzione di una interlingua è quella di essere in mezzo*), germano en Vieno.
- Ili vivas kun pratimo al ĉio fremda (*vivono con un timore primordiale verso tutto cio' che è straniero*), finlandano en Vieno.
- Tiu lingvisteco, kiun li havas...(*quell'essere linguista che gli appartiene...*), bulgarino en Vieno.
- Li fidis tro sian lingvistecon (*si è fidato troppo del suo essere linguista*), japano en Tokio
- Vi ne estas tre muzeema (*non sei molto museofilo*), svedlingva finalndano.
- Karaj alprelegotoj (*cari ascoltatori della mia imminente conferenza*), aŭstro en Zagrebo.
- Jam dekaj (*sono già le dieci*), germano en Aŭstrujo.
- Mi tezas, ke... (*io ho una tesi che...*) aŭstro en Aŭstrujo.

Ĉi tiuj frazoj de normalaj esperantistoj estis cititaj de Piron por montri, kiel esperantistoj rapide alproprigas al si la lingvon kaj utiligas ĝiajn rimedojn.

Ni imitu kaj Piron kaj ĉi tiujn normalajn esperantistojn. En Esperanto estas tute nature, laŭ Piron, diri "supreniri" aŭ "alsupri" kaj tre artefarite diri "ascendi".

Ne pro tio, ke oni skribis, ke "la damo ascendis en primavero", oni iĝas poemverkisto. Simple oni parolas en fremda lingvo, kiel se oni dirus en la itala (kaj multaj diras), ke "*il manager ha il know how per il merger*".